

ESPERANTO

sub la suda kruco

marto 2024





ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA
ESPERANTO-ASOCIOJ

Volumo 31[1] numero 153 marto 2024

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio

Redaktisto: Terry Manley

Provlegantoj: Donald Rogers, Trevor Steele, Nicole Else

Kunordigisto: Jonathan Cooper

Kontaktadreso: esk@esperanto.org.au

AEA – ESK

GPO Box 2122

Melbourne, Victoria 3001

Australia

Abonoj kaj pasintaj numeroj

Esperanto sub la Suda Kruc estas sendata al membroj de la Aŭstralio Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEa).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA: esperanto.org.au / info@esperanto.org.au

NZEa: esperanto.org.nz / esperantonewzealand@gmail.com

Kiel kontribui al Esperanto sub la Suda Kruc

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia kontaktadreso, esk@esperanto.org.au

Artikoloj kaj originalaj en Esperanto kaj tradukitaj en Esperanton estas akcepteblaj. Sed NE sendu permaŝinajn tradukojn (ekzemple per Google Translate).

Limdato por kontribuoj por la sekva numero

1a de majo 2024

La redaktistoj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

Por la opinioj aperantaj en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne necese spegulas la opiniojn aŭ de AEA aŭ de NZEA.

Copyright © 2024 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj
ISSN 2207-0087

SUR LA KOVRILO: *Libera tempo dum la Kongreso.*

Foto: Andrew Woods. Pri aliaj fotoj, vidu paĝon 30.

ENHAVO

Antaŭparolo	04
Intervjuo kun Hoan Tran	05
Intervjuo kun Orlando Raola	06
Terura vivo sen poŝtelefono	07
Fuŝe tuŝe	09
Rememoro pri HWR Petersen	10
La geniulo Lorenz	11
La lingvo de kolibroj	13
Kritiko pri 'La lingvo de kolibroj'	15
La filozofio de scienco, kaj arto	17
Kial mi estas ĉi tie?	22
Pasporta Servo	25
Vizito al la tria insulo	26
Financaj raportoj de AEA	28

Antaŭparolo

TERRY MANLEY

En 2023 abundis novaĵo pri AI: Artefarita Intelektu. Laŭ la gazeto *Nova Sciencisto*, en ĝia resumo de 2023, "OpenAI's ChatGPT" iĝis la plej rapide alprenita apo (app) iam ajn. Mia reago komenca estis tute malatenti la furoron. Sed mi baldaŭ konstatis, ke tio ne eblos. Mia edzino komencis uzi kaj esplori ĝin. Membro de AEA sendis artikolon verkitan de ĝi. (Vi povas legi tion sur paĝo 13, kaj poste la kritikan respondon de unu el niaj provlegantoj.)

Sed AI ne temas nur pri verkado aŭ desegnado. AI pli kaj pli invadas nian privatecon, sciante ĉion pri ni kaj niaj organizaĵoj. Oni ricevas celatajn

reklamojn pri oniaj plej ŝatataj deziroj. Ŝerĉrimedoj povas trovi, ĉu oni uzas bildojn kun kopirajtoj, kaj se jes, agento por la posedantoj de tiu kopirajto sendas fakturon. AEA jam spertis tion.

Ĉu oni timadus uzi ĝustajn nomojn, por eviti la eblecon, ke iu akuzos onin pri misuzo de kopirajta materialo? Ekzemple, komence mi uzis la nomon "Nova Sciencisto", anstataŭ la anglan nomon de tiu gazeto. Ĉu Esperanto iĝos interreta sekreta lingvo, kaŝanta la verajn anglajn nomojn?

Do ĉu oni entuziasme brakumu la "kuraĝan novan mondon", aŭ hezite eniru la "malsaĝan novan mondon"?



Grupfoto de la 2024 Aŭstralia Kongreso kaj Somerkursaro de Esperanto, Ballarat

Intervjuo kun Hoan Tran

DAVID RYAN (WELLINGTON, NOV-ZELANDO)

Mi prezentas intervjuon kun Hoan Tran, juna aktivulo en nia movado kaj unu el la instruistoj en la somerkursaro en Ballarat en januaro 2024.

Kie vi naskiĝis kaj kie vi nun loĝas?

Mi naskiĝis en Vjetnamio kaj, je la aĝo de 18 jaroj, mi translokiĝis el mia urbo al la ĉefurbo, Hanojo, kie mi nun loĝas. Mi studis ĉe universitato pri fremdaj lingvoj kaj nun mi instruas la vjetnaman lingvon al eksterlandanoj, kiuj laboras en Vjetnamio aŭ al aliaj eksterlandaj homoj, kiuj havas vjetnaman edzon, edzinon aŭ parencon.

Kiam vi esperantistiĝis kaj kiel vi aktivis en la Esperanto-movado?

En 2012 okazis la 97a Universala Kongreso (UK) de Esperanto en Hanojo. Antaŭ la UK oni organizis kurson de Esperanto en mia universitato. Mi partoprenis kaj lernis Esperanton en la kurso, kaj poste mi agis kiel volontulo dum la UK kaj la 68a Internacia Junulara Kongreso (IJK), kiu ankaŭ okazis en mia lando tuj post la UK en 2012.

Post la IJK en Vjetnamio mi bonŝance povis ĉeesti la IJK en 2013 en Israelo, kaj en 2017–18 mi volontulis dum ses monatoj ĉe la Centra Oficejo de la Universala Esperanto-Asocio (UEA) en Roterdamo.

Mi nun estas Prezidanto de la Vjetnama Esperantista Junulara Organizo



(VEJO), estrarano de la Vjetnama Esperanto-Asocio, kaj estrarano de la Komisiono de Azia Oceania Esperanta Movado (KAOEM) de UEA.

Kion vi opinias pri la estonteco de Esperanto?

Mi havas sufiĉe pozitivan opinionon pri la estonteco de Esperanto. Certe la angla lingvo estas grava, kaj multaj homoj en Vjetnamio lernas ĝin. Tamen, mi vidas nun, ke estas pli kaj pli da intereso pri

Esperanto kaj oni scias, post la pandemio, ke eblas facile lerni lingvon interrete. Multaj homoj vidas, ke mi vojaĝas, plejparte por kaj per Esperanto, kaj mi havas multan kontakton kun eksterlandaj esperantistoj.

Kiuj estas viaj impresoj pri Aŭstralio?

Mi trovas ke la naturo en Aŭstralio estas belega. Dum ĉi tiu kongreso en Ballarat mi povis viziti la muzeon Eureka, multon lernis pri la historio de Ballarat, promenis apud la bela lago en la botanika ĝardeno kaj vizitis bestoĝardenon, kie mi vidis kanguruojn, emuojn kaj diversajn aliajn tipajn aŭstraliajn bestojn. Mi ankaŭ ŝatas la plaĝon St Kilda en Melburno, kien mi certe reiros post la kongreso kaj somerkursaro. Mi volas ankaŭ mencii ke esperantistoj ĉi tie estas tre zorgemaj pri mi. 🇺🇸

Intervjuo kun Orlando Raola

DAVID RYAN (WELLINGTON, NOV-ZELANDO)

Mi prezentas intervjuon kun Orlando Raola, fama esperantisto kaj unu el la instruistoj en la somerkursaro en Ballarat en januaro 2024.

Kie vi naskiĝis kaj kie vi nun loĝas?

Mi naskiĝis en Havano, Kubo, kaj migris al Usono en 1994. Mi loĝas je 25 kilometroj norde de San Francisko, Kalifornio.

Kion vi faras profesie?

Mi estas profesoro pri kemio en komunuma altlernejo, kie oni studas la du unuajn jarojn de universitata studado.



Kiam vi esperantistiĝis kaj kiel vi aktiv- as en la Esperanto-movado?

Mi komencis lerni Esperanton per libroj en la nacia biblioteko de Kubo. Mi konsideras, ke mi esperantistiĝis en aprilo de 1984, kiam mi sendis leteron en Esperanto, plej verŝajne plenan je eraroj kaj sen akuzativo, al finna verkisto por peti ekzempleron de unu el liaj libroj.

Mia agado en la Esperanto-movado ŝanĝigis tra la tempo. Nun mi limigas mian aktivadon al membreco en la Akademio de Esperanto, kie mi estas fakulo pri faka lingvo. Antaŭe mi estis estrarano de UEA dum tri jaroj, komitatano de UEA dum preskaŭ 12 jaroj, kaj prezidanto de Esperanto USA dum ok jaroj.

Ĉu viaj familianoj parolas Esperanton?

Mia edzino, ankaŭ el Kubo, bone parolas kaj komprenas la lingvon sed ŝi ne estas movadano. De tempo al tempo ŝi kontribuas, ekzemple legante por blinduloj, ĉar ŝi havas tre belan voĉon. Nia 36-jara filo neniam lernis Esperanton.

Kion vi opinias pri la estonteco de Esperanto?

En nia nuna mondo la angla lingvo troviĝas ĉie, sed tio ne estas problemo por mi. Mi loĝas en anglalingva lando kaj la angla estas parto de mia vivo. Esperanto ne kontraŭbatalas la anglan.

Esperantistoj argumentas, ke denaskaj angleparolantoj ne

Daŭras >

sukcese vidas la problemon. Oni devas agnoski, ke kiam estas komunikado inter malsamlingvanoj en la denaska, nacia lingvo de unu el ili, estas esenca maljusteco en tiu komunikado. Mi kredas, ke venos momento kiam homoj rekonos tiun malegalecon kaj vidos Esperanton kiel solvon. Jen ŝanco por vera disvastigo de Esperanto, sed mi ne scias, ĉu tiu momento venos post 30 aŭ 300 jaroj. Intertempe esperantistoj havas taskon de vivteni la lingvon. Se ni ne plu entuziasme laboros por Esperanto, eble artefarita intelekto inventos alian solvon.


Kiuj estas viaj impresoj pri Aŭstralio?

Ĉi tiu ne estas mia unua vizito. Mi vizitis la unuan fojon en 2008 por faka kongreso. Mi kontaktis esperantistojn tiam kaj oni gastigis min en Esperanto-

Domo en Sidnejo.

Mi konis Kep Enderby, elstaran esperantiston en Aŭstralio.

Aŭstralio estas lando, kiun mi ŝategas. Dum mia infana aĝo mi lernis multon pri bestoj, kiuj ekzistas nur en Aŭstralio kaj mi studis pri ekologiaj katastrofoj kaj malbonaj konsekvencoj de agado de eŭropanoj, ekzemple enkonduko de serpentoj.

Aŭstralio estas altiro por mi. Kiam mia edzino kaj mi pensis pri migrado el Kubo, Aŭstralio kaj ankaŭ Nov-Zelando estis prioritataj celoj por ni. Ni sendis leterojn al la registaraj instancoj de la du landoj en 1993–94 sed ni neniam ricevis respondon! Ĝis nun ni ne scias, ĉu oni ne volis akcepti nin aŭ ĉu niaj leteroj neniam forlasis la poŝtoficejon en Havano. 

Terura vivo sen poŝtelefono

DAVID RYAN (WELLINGTON, NOV-ZELANDO)

Mi konstatis pasintjare ke mi pasigas tro da tempo kun mia poŝtelefono. Mi konas ĝin pli bone ol mian edzinon. Mi amas ĝin. Ĝi estas mia plej konstanta amiko kaj ĝi akompanas min ĉien. Mi eĉ donis al ĝi specialan nomon: *David's iPhone 14*. Kiam mi sentas min sola, mi parolas al ĝi kiel al sekreta amanto: “Hey Siri, kiu estas la ĉefurbo de Bulgario? Hey Siri, kiom da centimetroj en 23 kilometroj? Hey Siri, kioma horo estas nun en Londono?”. Mi mortus sen mia poŝtelefono. Kaj certe mi devas elspezi \$1500 ĉiujare por aĉeti novan modelon. Poŝtelefono estas pli multekosta ol mia edzino!

Tial, mi decidis provi pasigi almenaŭ unu tagon sen mia poŝtelefono. Je noktomezo de la 31a de decembro 2023, mi elŝaltis ĝin.

Ĉu eblus vivi sen poŝtelefono? Kio okazos? Ĉu la mondo finiĝos?

La 1an de januaro 2024...

Unue, mi preskaŭ ne vekigis. Mia poŝtelefono estas mia vekilo. Ĝi ne sonis. Sen mia poŝtelefono mi riskas dormi la tutan tagon. Finfine post ellitiĝo, sen povi kontroli veterprognozon, mi ne scias kiel vesti min. Ĉu hodiaŭ estos varma aŭ malvarma tago? Ĉu pluvos?

Sen kontroli Instagramon por vidi mil fotojn de bongustaj matenmanĝoj de aliaj personoj, mi ne scias kion manĝi. Ĉu turkstilaj ovoj estas la nuna manĝendaĵo? Sen kontroli la ĝisdatajn valorojn de miaj akcioj en la borso de Nov-Jorko, mi eĉ ne scias, ĉu mi havas sufiĉan monon por aĉeti matenmanĝon!

Daŭras >

Mi ne scias je kioma horo forlasi la domon. Sen povi kontroli retpaĝon de la transporta instanco, mi ne scias ĉu mia trajno alvenos ĝustatempe. Fakte, mi eĉ ne scias ĉu la mondo ankoraŭ ekzistas. Sen kontroli novaĵpaĝon, mi ne scias ĉu dum la nokto okazis terura milito aŭ pandemio aŭ zombia apokalipso. Mi vidas tra la fenestro, ke oni liveris mian tagĵurnalon antaŭ mia pordo (certe antaŭ zombia apokalipso) sed la "novaĵoj" en tiu tagĵurnalo estas jam historiaj eventoj.

Fakte, mi ne volas forlasi la domon pro timo ke zombioj promenas laŭ la stratoj. Se fakte okazis apokalipso, mi devas kontakti mian patrinon por demandi, ĉu ŝi bone fartas. Tamen, ŝi ne posedas poŝtelefonon kaj tial mi ne povas sendi tekstan mesaĝon. Mi certe ne volas telefonvoki al ŝia domo por paroli (!) kun mia patrino. Voĉa komunikado estas stultaĵo de la pasinta jarcento. Kaj kio okazas, se iu provas kontakti min nun? Sen mia poŝtelefono mi estas nekontaktebla. Eble ĉiuj jam pensas, ke mi estas mortinta pro zombia mordoj.

Aldone, se okazas apokalipso aŭ milito aŭ pandemio, sen povi konsulti retpaĝojn, mi ne scias kion mi devas opinii pri tia evento. Ĉu la apokalipso aŭ milito aŭ pandemio estas bona aŭ malbona? Aŭ ĉu sekreta registara konspiro? Kion opinias miaj Fejsbukaj amikoj? Mi vere ne bone

konas ilin, sed mi pasigas la tutan tagon interŝanĝante mesaĝojn kun ili kaj pro tio mi ne plu havas tempon por renkonti miajn verajn amikojn, kies vizaĝojn mi ne plu rekonas.

Tamen, apokalipso vere ne gravas. Sen mia poŝtelefono, kiel mi povas konsulti Tik Tok por informiĝi pri gravaj aferoj, kiel ludemaj katidoj aŭ Taylor Swift? Multe plej grave, mi ege volas scii, kiom da miaj "sekvantoj" ŝatis mian hieraŭan foton kaj skribis komentojn en Instagramo.

Tial, mi decidas ne forlasi la domon sed, sen mia poŝtelefono, mi panikas, ĉar mi ne povos kalkuli miajn hodiaŭajn paŝojn. Ĉu pli aŭ malpli ol antaŭ unu jaro?

Se mi devos resti hejme, mi legos libron. Ho ve, miaj librobretoj estas malplenaj. Ĉiuj miaj legaĵoj estas en elektronika formato. Kiel mi povos legi se mi ne havas poŝtelefonon? Kia stulta demando! Mi devos aŭskulti muzikon por trankviliĝi. Ho ve, mi ne posedas muzikaparaton. Mia poŝtelefono estas mia muzikilo.

Finfine, post tri minutoj, mi konstatas ke mi ne povas vivi sen mia poŝtelefono. Mi povas toleri zombian apokalipson, sed eĉ minuto sen mia kara poŝtelefono estas terura afero. Kaj fakte mi povos uzi mian poŝtelefonon kiel armilon por ataki zombiojn! 📱



Fuŝe tuŝe

TERRY MANLEY (ARMIDALE, NSK)

Iam estis facile telefoni geamikojn, familianojn. Oni levis la ricevilon, fingrumis la numeron, atendis respondon, kiu kutime alvenis, kaj interparolis. Fininte, oni remetis la ricevilon. Simple, ĉu ne?

Per mia fuŝtelefono, oni elpoŝigas ĝin, premas flankan butonon, atendas ĝis la ekrano lumiĝas, entajpas kodon por havi aliron al dekoj da elektoj, el kiuj oni elektas simbolon por telefoni, trovas la personon, kiun oni deziras telefoni, tuŝetas kontraŭ la telefona simbolo, kaj jen oni ricevas maŝinrespondon, ke la persono nuntempe estas nekontaktebla, do lasu dek-sekundan mesaĝon, kiun ia roboto fuŝtradukas en nekompreneblan tekston. Iam poste, ĉu minuton, ĉu semajnon, via amiko/familiano retelefonos al vi.

Sed la ilo estas mirakla ĉiailo. Oni povas demandi al ĝi, kiom da ŝtrumpetoj havis LL Zamenhof, kaj oni ricevas respondon. Oni povas navigi en urbego por trovi ian ajn atinglokon. Oni povas ĉeesti E-konferencon sur la alia flanko de la planedo, sen moviĝi. Oni povas foti ion ajn, iam ajn, kaj sendi al neatendanto. Oni povas ĉielumi. Eĉ ĉiele.

Sed nur se vi kapablas. Mi scivolas, kiu dezajnis mian fuŝtelefono. La ekrano plenigas la tutan surfacon, tiel, ke estas malfacile teni ĝin sen tuŝeti ion signifan sur la ĉeranda surfaco. Ekstere, en la sunlumo, estas preskaŭ neeble vidi la informon sur la ekrano. Oni vidas nur spegulatajn aferojn: arbojn, nebulojn, vizaĝon, k.s. Eble oni dezajnis ĝin por kaverno. Sed eĉ kiam oni estas en kaverno, estas malfacile legi la literetojn sur la ekrano. Oni bezonus lupeon por fari tion. Kaj kiajn fingrojn havas la dezajniston? Pintajn? Certe ne larĝajn.

Por doni ekzemplon pri mia fuŝtelefono

(ĉu fuŝtelefonanto): Mi promenis en montaro kun geamikoj, kiuj entuziasme fotis la florojn, montojn, ktp. Mi ekpensis, ja mi povas fari same. Elprenante la telefonon, mi funkciigis ĝin, elektis la fotilan simbolon kaj iom fuŝjonglis ĝin, evitante la lenstruon aliflankan. Mi aŭdis iujn sonetojn, sed kiujn, mi ne sciis. Mi direktis la aparaton kaj komencis foti – rokojn, florojn, muskon, k.s. Mi ne certis precize, kion mi fotis, ĉar la spegulado de la sunlumo estis forta kaj mi ne vidis la ekranon klare. Iam mi pensis, ke mi vidas spegulon de mia vizaĝo. Kiam ni revenis al nia loĝloko, ni komparis niajn fotojn, kaj estis ridegado kiam mi montris la miajn, ĉar ĉiuj estis memfoto de tre streĉiteca homo, kiu tordis la vizaĝon en diversaj strangaj manieroj.

Espereble, iam mi pli bone regos la tuŝtelefono. Sed ĝis tiam – fuŝe tuŝe. 📱



Rememoro pri estimata HWR Petersen

CHO SUNG HO (KOREA RESPUBLIKO)

Inter tiuj, kiuj signifoplene influis mian esperantistecon, mi nepre devus enkalkuli S-ron HWR Petersen el Nov-Zelando. Malkovrinte, ke Esperanto estas relative facila kiel fremda lingvo (almenaŭ tiam mi opiniis tiel, kvankam nun mi ne tute konsentas pri tio), mi sentime kaj senprudente defiis, jam en la dua jaro de mia esperantistiĝo, al la tradukado de kelkaj malnovaj rakontoj kaj en 1975 publikigis ilin libroforme kun la titolo *Ĉunhjang*. Mi dissendis la vantajn prodaĵojn al diversaj libroservoj, inkluzive tiujn de UEA kaj SAT.

Post monatoj, tute ne antaŭvidinte, mi ricevis poŝtaĵojn el Nov-Zelando, en kiu mi trovis modestan, broŝuro-formatan *Nov-Zelanda Esperantisto* (n-ro 386, 1-1976), la organon de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio. Je miaj ĝojo kaj ekscitiĝo, tie estis favora recenzo pri mia libro. Ĝin verkis S-ro Petersen, kiu estis siatempa redaktoro de la gazeto.

En la recenzo li indikis plurajn gramatikajn erarojn kaj nekutimajn

esprimojn de la teksto kaj lastaparte komentis, ke la libro estas “leginda kontribuajo al nia literaturo el malmulte konata lando kaj antikva kulturo, taŭga por memdistrado kaj por klaslegado.” Post nelonge mi spegulis ĉiujn liajn rekomendojn en la dua eldono kaj ree sendis ĝian ekzempleron al li. En la dua recenzo (n-ro 391, 6-1976), eĉ pli favora ol la antaŭa, li interalie esprimis siajn “fortajn simpation kaj intereson pri la popolo kaj kulturo koreaj”. Li aldonis ke, surprize por mi, li deĵoris en Koreio dum 26 monatoj (1957–59).

Danke al liaj malavaraj kuraĝigaj vortoj en la recenzoj, mi sukcesis pliampleksigi la libron, aldoninte du pliajn rakontojn, kaj eldonigi ĝin post jaroj en pli deca formato kun la titolo *Koreaj Malnovaj Rakontoj*. Laŭ lia deziro, la libro estis uzata kiel legolibro por individuoj kaj grupoj, ne nur en Koreio sed eĉ en aliaj landoj. Kvankam mi neniam estis sub la firmamento kun la Suda Kruco, kiel mi povos forgesi S-ron HWR Petersen pro lia nemezurebla kontribuo por mia esperantista kariero! **E**



Maj. Harold William Rosen Petersen fotita dum servo en la Vjetnamia Milito

La geniulo Lorenz

KATJA STEELE KAJ TREVOR STEELE (ADELAJDO)

Trevor Steele: Francisco Valdomiro Lorenz estas konata inter esperantistoj kaj spiritistoj de Brazilo, sed vi ĵus legis libron pri li en la ĉeĥa¹. Kial en tiu lingvo?

Katja Steele: Ĉar Lorenz estis ĉeĥo kaj ĉeĥa esperantisto, V Novobilský verkis lian biografion en la ĉeĥa. Lorenz naskiĝis 1872.12.24 en Zbyslav, Ĉeĥio, tiutempe parto de la Aŭstra-Hungara Imperio. Lia familio estis malriĉa. Lia ĉeĥa nomo estis František Vladimír Lorenc, sed en Brazilo li ŝanĝis sian nomon al Francisco Valdomiro Lorenz.

TS: Sendube li pasigis grandan parton de sia vivo en Brazilo.

KS: Li vivis nur 21 jarojn en Ĉeĥio. En 1893 li elmigris al Brazilo.

TS: Kial li elmigris?

KS: Por eviti enkarceriĝon kaj devigan soldatiĝon. Li estis socialisto, agitanto en la praga junulara movado, kaj ne volis batali por la registaro de la Habsburga Imperio.

TS: Sed se li estis de malriĉa familio, kiel li financis tiun elmigradon?

KS: Post la abolo de sklaveco en Brazilo, la registaro subtenis enmigradon. Oni bezonis laboristojn, ĉefe el Eŭropo, por senbarbarigi kaj krei bienojn en tiu vasta lando. Do tiu registaro finance apogis la vojaĝon de Lorenz kaj multaj aliaj.

TS: Oni imagas, ke la fruaj jaroj estis tre malfacilaj por senmona urbano.

KS: Jes, li devis propramane faligi arbojn kaj planti semojn. Ne estis publika transporto en Rio Grande do Sul, la provinco, kie li setlis.

TS: Ĉu li havis familion?

KS: Kiam li estis 23-jara li edziĝis al 17-

jara Ida. Ili havis 13 infanojn, el kiuj tri mortis. Krome ili adoptis kelkajn infanojn kaj ĉiamaniere helpis aliajn neprizorgatajn infanojn.

TS: Oni scias, ke Lorenz estis brila lingvisto. Kiom da lingvoj li konis?

KS: Pli ol cent. Inter ili estis, por nomi nur kelkajn, ĉiuj slavaj lingvoj, multaj indianaj, la aramea, hebrea, greka, japana... Li verkis plurajn lernolibrojn, inter aliaj gramatikon de la portugala por poloj en tiu regiono, kiuj havis grandajn problemojn interkompreniĝi.

TS: Li okupiĝis ankaŭ pri planlingvoj, ĉu ne?

KS: 15-jare li verkis poemkolekton en Volapuko kaj sendis ĝin al Schleyer, kiu dankis lin kaj nomis lin poeto. Li studis plurajn aliajn planlingvojn, sed fine elektis Esperanton. Li korespondis kun Zamenhof, kaj estis la unua esperantisto en Ĉeĥio kaj unu el la unuaj en Brazilo. Jam, kiel malriĉa studento en 1890, li proprakoste verkis kaj eldonis la unuan lernolibron de Esperanto por ĉeflingvuloj.

TS: Pri kio li krome aktivis?

KS: Lorenz estis instruisto, filozofo, homeopato, tradukisto, astronomo, kabalisto, framasono, rozkrucano, mediumo, spiritisto, verkisto, kuracisto, tradukisto interpretisto, kaj fondinto kaj direktoro de lernejo.

TS: Sed se oni okupiĝas pri tiom da kampoj, ĉu la scioj ne estas iom supraĵaj?

KS: En lia kazo ne! Ekzemple, kiam la tiel nomata "hispana gripo", kiu mortigis plurajn dekmilionojn en la tuta mondo, atingis Brazilon, neniu en la regiono, kie Lorenz vivis, mortis pro ĝi: Lorenz

Daŭras >

evoluigis ian vakcinon, kiu estis efika rimedo kontraŭ la gripo.

TS: Estante multflanka eminentulo, li riĉiĝis, ĉu?

KS: Li neniam estis riĉa, vivis ege simple en ege modesta domo. Sian monon li dediĉis al la bezonoj de aliaj homoj kaj eldonado de siaj multaj verkoj. Li senpage servis kiel kuracisto kaj financis lernejon, kiun li mem kreis.

TS: Se li ne estis riĉulo, ĉu li ne tamen ricevis multe da honorigoj?

KS: La guberniestro de Rio Grande do Sul proponis al li bone pagatan postenon kiel tradukisto en la centra registaro de la lando. Lorenz estis kortuŝita sed preferis resti en la lernejo, kie oni nepre bezonis lin. En 2012 oni starigis monumenton al Lorenz en Dom Feliciano, la urbeto, kie li loĝis.

En 1931 la relative nova ŝtato Ĉeĥoslovakio invitis Lorenz kaj lian familion reveni al sia hejmlando, sed li decidis resti en Brazilo. Tie en 1975 estis fondita Spiritisma Eldona Asocio F.V. Lorenz, kiu i.a. eldonas ĉiujare *Almanako Lorenz*. En 2012 estis en urbo Dom Feliciano inaŭgurita monumento-tomboŝtono al Lorenz. La Ĉeĥa Respubliko finance kontribuis al ĝia konstruo kaj la festan ceremonion partoprenis la ambasadoro de Ĉeĥio en Brazilo. Bedaŭrinde, krom inter esperantistoj, en la nuna Ĉeĥio Lorenz estas apenaŭ konata.

TS: En sia modesteco, bonkoreco kaj talentoj li iom similis al Zamenhof.

KS: Jes. Kaj ili ambaŭ konsciis pri la dezirindeco de komuna tuthomara lingvo kaj laboris diverskampe por tiu nobla celo.


TS: Ĉu la libro de Novobilský mencias *Esperanto kiel revelacio*, laŭdire la plej efikan varbilon por nia lingvo en Brazilo?

KS: *Esperanto kiel revelacio* aperis kiel verko de Francisco Cândido Xavier, la plej konata brazila mediumo. Xavier mem ne estis parolanto de Esperanto. Li deklaris, ke la teksto estis diktita al li de la spirito de Lorenz.

TS: Lorenz estis evidente mirinda homo.

KS: Mirinda kaj admirinda. Ne nur granda intelektulo, sed ankaŭ nobla humanisto kaj filantropo. Mi tre kontentas ekkoni lin. **E**

1. Vastimil Novobilský, *František Vladimír Lorenc*, KAVA-PECH, Dobříchovice, 2017



La lingvo de kolibroj

TEKSTO: CHATGPT • PETO: JOANNE JOHNS (MELBURNO)

Rimarku: Ni ne korektis la tekston de ĉi tiu artikolo, verkita per artefarita intelekto, por montri kia ĝi estas. Vidu la kritikon kaj rekomendojn en la sekva artikolo.

Kolibroj, konataj pro siaj brilaj plumoj kaj rapidaj flugilbatoj, posedas ankaŭ unikan kaj ofte pretervidatan komunikadformon – ilian lingvon. Ĉi tiu lingvo ne nur konsistas el la melodiemaj pepoj kaj tviteroj tipaj por birdoj, sed ĝi ampleksas sofistikan sistemon de sonoj, korpmoveoj kaj koloraj montradoj, faciligante interagojn ene de ilia specio kaj kun ilia medio.

Ĉe la kerno de kolibra komunikado estas ilia voĉigo. Kontraŭe al populara kredo, kolibroj faras sonojn preter la zumo de siaj flugiloj. Ĉi tiuj sonoj inkluzivas diversajn ĉirpojn, zumojn kaj aliajn voĉigojn, kiuj transdonas malsamajn mesaĝojn. Ekzemple, la “persekutvoko” – laŭta, ripetema ĉirpado – ofte uzatas dum

agresaj renkontoj, avertante entrudulojn aŭ konkurantajn masklojn resti for de ilia teritorio aŭ paro. Aliflanke, pli mildaj ĉirpoj kaj tviterado povas servi en kortumado, helpante masklon allogi inon aŭ komuniki dum pariĝaj ritoj.

Interese, la frekvenco kaj tonalto de ĉi tiuj sonoj estas agorditaj al la specifaj aŭdkapabloj de kolibroj. Iliaj altfrekvenciaj voĉigoj estas preter la gamo de multaj predantoj, provizante sekuran kanalon por komunikado. Krome, ĉi tiuj sonoj povas varii inter specioj, permesante specif-specian komunikadon, gravan en areoj, kie multaj kolibraĵaj specioj kunekzistas.

Korplingvo ankaŭ ludas gravan rolon

Daŭras >



Kolibro (artefarita bildo)

en kolibra komunikado. Ĉi tiuj malgrandaj birdoj uzas serion da gestoj kaj posturoj por transdoni mesaĝojn. Ofte vidata montrado estas la “navetdanco”, farita de maskloj por allogi inojn. Ĉi tiu kompleksa danco inkluzivas rapidajn antaŭen-kaj-revenajn movojn, kombinitajn kun montradoj de brile koloraj plumoj. La brilantaj gorĝoplumoj de masklaj kolibroj, kiuj povas ŝanĝi koloron laŭ la angulo de lumo, estas aparte uzataj en ĉi tiuj montradoj por allogi parojn aŭ intimidigi rivalojn.

La zumado de iliaj flugiloj, ofte pensata kiel simpla flankprodukto de ilia rapida flugo, ankaŭ kontribuas al ilia lingvo. La frekvenco kaj tono de la zumo povas ŝanĝiĝi bazita sur la rapido kaj padrono de flugilbatoj, eble komunikante malsamajn emociojn aŭ intencojn. Agititaj aŭ ekscititaj kolibroj povas bati siajn flugilojn pli rapide, produktante pli altan zumon, kiu povus servi kiel averto al aliaj.

Kolibroj ankaŭ komunikas tra sia interagado kun la medio. Ekzemple, ilia elekto de nestumaj lokoj, nutradaj kutimoj kaj migradvojoj ne estas hazardaj, sed estas bazitaj sur kompleksaj decidprocezoj influataj de mediaciaj signaloj kaj interspecia komunikado. Ĉi tiuj elektoj povas komuniki teritoriajn postulojn aŭ indiki la ĉeeston de rimedoj al aliaj kolibroj.

La lingvo de kolibroj, do, estas plurflanka sistemo ampleksanta voĉigojn, korpmoveojn kaj interagojn kun la medio. Ĉi tiu lingvo ne estas nur komunikilo, sed ankaŭ ilo por supervivo, helpante en pariĝado, nutrado kaj teritoria defendo. Dum esplorado daŭre malkovras la kompleksecojn de kolibra komunikado, ni akiras pli profundan aprezon por ĉi tiuj mirindaj kreitaĵoj kaj la kompleksaj manieroj, kiujn ili interagigas kun la mondo ĉirkaŭ ili.

ANGLE

Hummingbirds, renowned for their vibrant plumage and rapid wingbeats, also possess a unique and often overlooked form of communication – their language. This language is not just confined to the melodious chirps and tweets typical of birds but extends to a sophisticated system of sounds, body movements, and color displays, facilitating interactions within their species and with their environment.

At the core of hummingbird communication is their vocalization. Contrary to popular belief, hummingbirds do make sounds beyond the hum of their wings. These sounds include a variety of chirps, buzzes, and other vocalizations that convey different messages. For instance, the ‘chase call’ – a loud, repetitive chirping – is often used during aggressive encounters, warning intruders or competing males to stay away from their territory or mate. On the other hand, softer chirps and twittering may serve in courtship, helping a male attract a female or communicate during mating rituals.


Interestingly, the frequency and pitch of these sounds are tuned to the specific hearing abilities of hummingbirds. Their high-frequency vocalizations are beyond the range of many predators, providing a safe channel for communication. Additionally, these sounds can vary between species, allowing for species-specific communication, vital in areas where multiple hummingbird species coexist.

Body language also plays a critical role in hummingbird communication. These tiny birds use a series of gestures and postures to convey messages. A common display is the ‘shuttle dance’, performed by males to attract females. This intricate dance involves rapid back-and-forth movements, combined with flashes of brightly colored feathers. The dazzling throat feathers of male hummingbirds, which can change color with the angle of light, are particularly used in these displays to attract mates or intimidate rivals.

The humming of their wings, often thought to be a mere byproduct of their rapid flight, also contributes to their language. The frequency and tone of the hum can change based on the speed and pattern of wingbeats, potentially conveying different emotions or intentions. Agitated or excited hummingbirds may beat their wings faster, producing a higher-pitched hum, which could serve as a warning to others.

Hummingbirds also communicate through their interaction with the environment. For instance, their choice of nesting sites, feeding patterns, and migration routes are not random but are based on complex decision-making processes influenced by environmental cues and inter-species communication. These

choices can communicate territorial claims or indicate the presence of resources to other hummingbirds.

The language of hummingbirds, thus, is a multifaceted system encompassing vocalizations, body movements, and interactions with the environment. This language is not just a means of communication but also a tool for survival, aiding in mating, feeding, and territorial defense. As research continues to unveil the complexities of hummingbird communication, we gain a deeper appreciation for these remarkable creatures and the intricate ways in which they interact with the world around them. 

Kritiko pri ‘La lingvo de kolibroj’

DONALD ROGERS (WELLINGTON, NOV-ZELANDO)

Jen tekstoj generitaj de ChatGPT, kiu estas Larĝa Lingva Modelo (babilroboto uzanta artefaritan intelekton). Estas du tekstoj: angla kaj Esperanta. La Esperanta teksto estas iom angleca, do mi supozas, ke ChatGPT generis la anglan version kaj tradukis ĝin al Esperanto. Kiam mi provlegis ĝin, mi certe volis korekti ĝin, sed redakti ĝin sen komenti kaj prezenti ĝin en *ESK* kiel ordinara artikolo, ne estus juste, konsidere, ke ĝi estas produkto de ChatGPT, ne de esperantisto. Tial mi decidis studi la tekstojn, precipe la esperantan version.

Eraroj

La programo eraris en kelkaj lokoj, eĉ pri sufiĉe oftaj esprimoj:

- “altfrekvenciaj” estu “altfrekvencaj”
- “melodious” ne estas “melodiemaj” sed “melodiaj”
- “repetitive” estu “ripeta” aŭ “ripetanta”
- “mate”, ĉi tie signifas “parulo” (ano el paro); “paro” estas duopo

- “*species-specific*” estu “speciospecifa”
- “*back and forth*” estu “tien kaj reen”

Falsaj amikoj

ChatGPT elektis iujn malĝustajn eblojn el iuj falsaj amikoj.

- “s sofistika” estas mistraduko de “*sophisticated*”, kiu ĉi tie havas la sencon “evoluinta” aŭ “kompleksa”.
- “*different*” en “*different messages*” kaj “*different emotions or intention*”, kutime estas “diversaj”.
- “*chase call*” ŝajne estas fakesprimo de ornitologoj, kaj signifas “forpela voĉo”.
- “*courtship*” pri homoj estas “amindumado”, sed pri birdoj ĝi povas esti “pariĝo”.
- “*display*” estas tikla vorto, kaj havas diversajn nuancojn. Vidu en *PIV*. Por traduko de “*system of sounds, body movements, and colour displays*”, taŭgas “sistemo de sonoj, korpesprimoj kaj elmontrado de siaj koloroj”.

Daŭras >

- *“body language”* estas “korpespermo”.
- *“posture”* estas “starmaniero” aŭ, pli bone ĉi tie, simple “pozo”. Ŝajnas ke ChatGPT inventis vorton bazitan sur la angla vorto.
- *“intimidate”* estas “timigi”; ChatGPT inventis vorton bazitan sur la angla vorto.
- *“think”* povas esti “pensi”, “kredi”, “opinii”, “konsideri”. Sed por *“often thought to be a mere byproduct”*, oni povas diri “kiun oni ofte supozas nura flanka produkto”.

Enhavo

Oni povus kritiki la enhavon de la artikolo. Ĝi ne menciis la sirinkson, la voĉorganon de birdoj, aŭ la rolon de la kolibra cerbo en komunikado. Mi ne scias precize kion Joanne petis al ChatGPT, do mi ne komentis plu pri tio.

Konkludo

La tekstoj de ChatGPT estas interesaj, ĉar ni povas vidi kiel malfacile estas traduki teknikan tekston anglan en

Esperanton. Kvankam la tradukaĵo estas sintakse tre bona, ekzemple, la akuzativo estas ĝustaj, aliflanke iuj vortelektaj estas ne taŭgaj, la programo inventis iujn vortojn bezonatajn sed mankantajn al si.

Supozeble, ChatGPT kapablas lerni per interagoj kun uzantoj. Stephen Hughes diris: “Estas tiu kapablo lerni kiu plibonigos la funkciadon de AI-oj, kaj igi ilin elstari el iom limigitaj komputilhelpataj (diagnozaĵ) algoritmoj.”

Ĉi tiu takso montras la malfacilaĵojn traduki en lingvon (Esperanto) kiu havas relative malgrandan literaturon en la interreto. Por ke Larĝa Lingva Modelo sukcesu, ĝi bezonas vastan kvanton da Esperanta teksto, ne nur pri movadaj aferoj, sed pri kolibroj, aliaj birdoj, aliaj organismoj, pri ĉio. Do ni verku plu! 📖

Referencoj

eo.wikipedia.org/wiki/ChatGPT

en.wikipedia.org/wiki/Hummingbird

theconversation.com/how-good-is-chatgpt-at-diagnosing-disease-a-doctor-puts-it-through-its-paces-203281



Iuj aspektoj de la filozofio de scienco, kaj arto

JONATHAN COOPER (GOSFORD, NSK)

Bazita sur prelego prezentita ĉe la Aŭstralia Kongreso de Esperanto, Ballarat, Viktorio, la 8an de Januaro 2024

Tiu artikolo temas pri iuj paraleloj inter la ĉefaj ŝanĝoj en scienco kaj tiuj en arto. Ĝi estos kiel helikoptera flugo super vasta tereno. Ni plejparte rigardos de supre for, serĉante la grandan bildon. Foje, ni alteriĝos mallonge por proksima rigardo.

Kio estas scienco?


Unu difino de scienco estas “la serĉo de algoritmaj kunpremoj” (kiel zipado de komputila dosiero): Sciencistoj listas sekvencojn de observitaj datenoj. Ili provas formuli algoritmojn, kiuj kompakte reprezentas la inform-enhavon de tiuj sekvencoj. Poste, ili provas la ĝustecon de tiuj hipotezaj mallongigoj, uzante ilin por prognozi la sekvajn erojn en la sekvencoj.

Kvankam ni nun estas en la 21a jarcento, la komenco de nia moderna pensmaniero povas esti trovata antaŭ almenaŭ 130 jarojn, je la lasta duono de la 19a jarcento. Estas paraleloj inter la ĉefaj kontraŭaĵoj en arto kaj scienco. Du el ili

estas: **absolutismo kontraŭ relativismo** (kiu povas esti spurata malantaŭen, al la 15a jarcento), kaj **determinismo kontraŭ necerteco**.



Bildo 2: Sano di Pietro, Madono kaj infano kun sanktuloj kaj anĝeloj (malfrua 15a jc.)



Bildo 1: Epicikloidoj

Absolutismo kontraŭ relativismo

Laŭ la opinio de Ptolemeo pri la universo, la tero estas en la absoluta centro. La suno, luno kaj steloj estas fiksitaj al la interno de “ĉiela globo”. La strangaj, lopaj vojoj de la planedoj estis klarigitaj per teorio de “epicikloidoj” (Bildo 1).

Tiu teorio *iom* funkcias, sed ĝi ne estas tre eleganta aŭ kontentiga. Tamen, ĉu

Daŭras >



Bildo 3: *Rafaelo, Fianĉiĝo de la virgolino* 1504

tio estas valida scienca kritiko de teorio? Sciencistoj sekvas principon (filozofian aŭ estetikan principon) konatan kiel la "Razilo de Occam [Okm]", kiu ofte estas esprimita tiel: "Se estas du kontraŭaj teorioj, kaj nek unu nek la alia povas esti pruvita aŭ malpruvita, akceptu la pli simplan."

Arto antaŭ la Renesanco ankaŭ montris absolutismon – de tempo kaj spaco. Ekzemple, la pentraĵo de Sano di Pietro (malfrua 15a jarcento) en Bildo 2. Maria kaj Jesuo estas pentritaj pli grandaj ol la sanktuloj kaj anĝeloj ĉirkaŭantaj ilin, ĉar ili estas pli gravaj – ne pro perspektivo. Jesuo estas montrita kiel bebo, sed Johano la Baptisto, kiu havis proksimume la saman aĝon kiel Jesuo, estas montrita kiel viro. Kial? Ĉar estas spirita vero, kiun la artisto deklaras. La fono estas orfolio,

ĉar tiu bildo montras eternan, ĉielan veron, ne tempan, teran historion. Tio ankaŭ klarigas kial perspektivo estus sensignifa.

Kontraste, la arto de la Renesanco (precipe la Alta Renesanco) elmontris relativismon de spaco. Ekzemple, la pentraĵo de Rafaelo (1504) en Bildo 3. Ĝi ankaŭ estas religia bildo, sed ĉi-foje la artisto difinas sian pozicion en la spaco, kvazaŭ li estintus tie dum tiu evento. Alivorte, la sceno aspektus malsame se prezentite de malsama angulo.


Ekzistas alia speco de relativismo: *emocia* relativismo. Ekzemple, rigardu la pentraĵon de Rembrandt, *La neo de Petro* (1660) en Bildo 4. La artisto priskribas sian personan respondon al la temo. Rembrandt uzas la lingvon de lumo kaj ombro por esprimi la emociojn, kiujn li asocias kun tiu Biblia rakonto.

Determinismo kontraŭ necerteco

En klasika fiziko (t.e., la fiziko de Isaac Newton [Ajzek Njut'n], la universo estas kiel giganta, malsimpla maŝino (kaj do, Dio estas kiel "la Granda Horloĝisto"). La leĝoj, aŭ principoj, de forto kaj moviĝo



Bildo 4: *Rembrandt van Rijn, La neo de Petro* 1660



Bildo 5: La "klasika" modelo de la atomo

estas nomataj "mekaniko". Kelkaj el tiuj principoj estas:

- Materio kaj energio estas apartaj
- Forto egalas maso multiplikata de akcelo
- Se oni scias tri el la kvin valorojn de komenca rapideco, rapideco, akcelo, distanco veturita, kaj tempo, oni povas kalkuli la du nekonatajn.
- Se oni havas precizan priskribon de la karaktero, pozicio kaj rapideco de ĉiu partiklo en la universo en iu aparta momento, kaj komprenon de la fortoj, kiuj funkcias inter tiuj partikloj, oni povas antaŭvidi la postan evoluon de la Universo kun tiom da precizeco kiel dezirate.

Tiu vido de la universo estas nomita "determinismo". Nu, kompreneble, akiri tute detalan priskribon de la tuta universo iam ajn ne estis realisma entrepreno, nek solvi ĉiujn ekvaciojn necesajn por antaŭdiri ĝian estonton. Sed ne pri tio temas. Sufiĉas, ke la estonteco estis ordigita. Se oni akceptus la proponon ke homoj estas tute fizikaj sistemoj, kunmetitaj de partikloj el materio, kiuj


obeas fizikajn leĝojn de moviĝo, tial *principe*, ĉiu estonta homa ago estus jam determinita de la pasinteco. Por iuj, tio estas la finfina indiko de Dio: kie ekzistas dezajno, devis ekzisti dezajnistoj; kie estis horloĝo devis esti horloĝisto. Por aliaj, estas tute la malo: neado de la doktrino de libera volo, kiu asertas ke homoj estas liberaj determini siajn proprajn agojn. Eĉ por tiuj *sen* religiaj konvinkoj, la ideo, ke ĉiuj el niaj pensoj kaj agoj estis antaŭdeterminitaj *principe*, eĉ se ne praktike, kaŭzas la neŭtonan universon ŝajni strange malkongrua kun nia ĉiutaga sperto de la kapricoj de la homa vivo. Tamen, kiel ni vidos, la alternativo al determinismo estas eĉ pli malcerta.

La "klasika" modelo de la atomo estas kerno kun elektronoj ĉirkaŭflugantaj ĝin (Bildo 5). La problemo estas ke, laŭ klasika fiziko, la elektronoj devus preskaŭ tuj spirali enen, kaj kraŝi en la nukleon. Evidente, tio ne okazas. Do, fiziko bezonis novan modelon de la atomo. Tia modelo estas: **kvantum-fiziko**.

Jen tri bazaj principoj de kvantum-fiziko:

- Energio estas "kvantigita" (kun diskretaj "saltoj" anstataŭ kontinua gamo)
- Elektronoj (partikloj) estas ondoj (kaj partikloj, samtempe): kio estas dualeco
- Simile, lumo (ondo) estas serio de partikloj (kaj ondo, samtempe)

Fakte, *ĉiuj* subatomaj partikloj agas kiel ondoj. Tio, kio agas kiel ondo, estas la probabloj de kie tiu partiklo estos. La kialo, ke lumo foje ŝajnas funkcii kiel ondo, estas ĉar ni rimarkas la amasiĝon de multaj el la lumaj partikloj distribuitaj



Bildo 6: Probablo-denseco-desegnaĵoj de iuj hidrogenaj atom-orbitoj.

La denseco de la punktoj reprezentas la probablon trovi la elektronon en tiu regiono.

super la probabloj de kie ĉiu partiklo povus esti. Tio iom similas al la markoj lasitaj de saĝetoj sur saĝet-tabulo.

Bildo 6 montras ses diagramojn de elektronaj “nuboj”: la probablo-desegnaĵoj de iuj hidrogenaj atom-orbitoj. La denseco de la punktoj reprezentas la probablon trovi elektronon en tiu regiono. La necerteco-principo de Heisenberg [Hajznberg] diras, ke oni povas mezuri aŭ pozicion aŭ impeton de subatoma partiklo, sed *neniam ambaŭ*. Tio povas ŝajni stranga, sed pripensu ĉi tiun demandon: Kiel oni mezuras aferojn? La respondo kutime estas, “rigardante”. Sed, rigardi postulas lumon (fotonojn), kiuj havas pli-malpli la saman grandecon kiel la partikloj, kiujn oni mezuras!

Komparu tion kun fotado: Kiam oni fotos kurantan homon, oni aŭ:

- uzas rapidan ekspon-rapidecon por kapti la *formon* (sed forlasas informojn pri la movo), aŭ
- uzas malrapidan ekspon-rapidecon

por priskribi la *movon* (sed forlasas informojn pri la formo).

Do, ĉu tio signifas, ke la klasika fiziko de Newton estis forlasita de nuntempaj sciencistoj? Ne; klasika fiziko ankoraŭ utilas. Ĝi estas neperfekta teorio, sed ĝi estas nur draste fuŝa kiam temas pri tre *etaj* aferoj (ĉe atomaj aŭ subatomaj grandecoj, kie kvantuma fiziko estas uzata) aŭ pri *rapidegaj* aferoj (proksime al la lumrapideco, kie relativeco transprenas). Por ĉiutagaj aferoj, kiuj estas multe pli grandaj ol atomoj kaj multe pli malrapidaj ol lumo, klasika fiziko faras bonegan laboron. Estas ĉe la limoj, kie la subatoma kampo kaj la makroskopa kampo de la ĉiutaga vivo foje interrilatas, ke ekzistas iuj tre strangaj paradoksoj.

La plej fama estas **la kato de Schrödinger** [Ŝræ:dinger]. En 1935 Erwin Schrödinger kreis la jenan pens-eksperimenton: Kato estas enfermita en ŝtala skatolo, kune kun la jena diabla aparato: en Gejger-nombriilo estas eta radio-aktiva substanco, tiel eta ke eble, dum unu horo, unu el la atomoj kadukiĝas, sed ankaŭ, egale probable, eble neniu. Se ĝi kadukiĝas, la Gejger-nombriilo elŝargiĝas kaj, per relajso, liberigus martelon, kiu frakasus malgrandan botelon da klorhidra acido kaj mortigus la katon. La demando estas, je la fino de la horo, tuj antaŭ ol la skatolo estas malfermata, *ĉu la kato vivas aŭ mortas?* Antaŭ ol la observanto malfermas la skatolon, la sorto de la kato estas ligata al la ondo-funkcio de la atomo, kiu estas, en si mem, en supermeto de kaduka kaj nekaduka statoj. Do, laŭ Schrödinger, la kato mem devas esti en supermeto de morta kaj vivanta statoj antaŭ ol la observanto malfermos la skatolon, observos la katon kaj kolapsigos ĝian ondo-funkcion.

Do, resume, la *klasika* modelo



Bildo 7: Paul Cézanne, Frukto, buŝtuko kaj laktujo ĉ. 1880


de la universo estas ordigita, teorie antaŭvidebla sistemo konsistigita de observeblaj objektoj en moviĝo, kvankam la kvantuma modelo de la universo estas sistemo de necertecoj kaj probabloj. Kiel Jack Cohen kaj Ian Stewart verkis en sia libro, *La Kolapso de Kaoso*¹: “La universo faras ĉion, kion ĝi povus fari, samtempe, kaj kolektas la rezultojn.” Aŭ, por diri ĝin alimaniere: “La scienca kompreno de tio, kio efektive okazas, baziĝas sur la kontemplado de eblecoj, kiuj ne okazas.”

Bildo 7 montras pentraĵon de Paul Cézanne [Pol Sezán]. Same kiel multaj verkoj de tiu artisto, ĝi abundas je necerteco kaj ambiguaĵoj: La objektoj kaj fono estas traktataj egale grave, la malantaŭa rando de la tablo havas malsamajn nivelojn ĉe ambaŭ rando de la ŝtofo, kaj la tigo de la vitro ŝajnas rompita.

Antaŭe, mi difinis sciencon kiel “la serĉo por algoritmaj kunpremoj”. Tamen, tio estas nur duono de la rakonto. Pensu pri scienca esplorado

kiel funelo (Bildo 8). La demando estas, kiun vojon ĝi iras? **Reduktismo** (maldekstre) deklaras, ke komplekseco sur unu nivelo povas esti klarigita per simpleco sur pli malalta nivelo. **Tutismo** (dekstre) deklaras, ke grandskalaj, “simplaj” fenomenoj sur unu nivelo povas esti klarigitaj kiel la “averaĝaj” rezultoj de kompleksaj interagoj sur pli malalta nivelo.

Male al “absolutismo kontraŭ relativismo” aŭ “determinismo kontraŭ nedeterminismo”, scienca pensado *ne* evoluis de reduktismo al tutismo.

Anstataŭe, reduktismo kaj tutismo estas kiel la onda kaj partikla naturo de materio: **dualeco**. 

¹. Jack Cohen, Ian Stewart, *The Collapse of Chaos: Discovering Simplicity in a Complex World*, Penguin Books, 1994



Bildo 8: Scienca esplorado kiel funelolaktujo

Kial mi estas ĉi tie?

TERRY MANLEY (ARMIDALE, NSK)

Mi estas parte ĉi tie pro mia prapraavo, William Manley, kiu enmigris Aŭstralion en 1853. Li alvenis per la ŝipo Calliope, kiu atingis Melburnon la 18an de majo, 1853. Tridekjaraĝa, li alvenis kun sia edzino, Hannah, dum epoko de granda amasmigrado al Aŭstralio. Tio okazis ne nur pro la malkovro de oro en la orientaj ŝtatoj, sed pro parta sendependiĝo de la kolonioj kaj la ĉesigo de transportado tien de malliberuloj. Kaj William kaj Hannah scipovis skribi kaj legi, indiko al la programo de la brita registaro kaj tiu de Caroline Chisolm, kiuj celis allogi "taŭgajn enmigrantojn".

Dum la 1840a jardeko jam komenciĝis pli granda enmigrado, kvankam ne same granda kiel en la 1850a pro la ekamasmigrado por serĉi oron. En la 1840a jardeko estis puŝo farata de la kolonioj ĉesigi transportadon de malliberuloj kaj havigi al si konstituciojn. En 1838 la nombro de loĝantoj (se oni ne kalkulas indiĝenojn) estis ĉ. 152 000. En la 1840a jardeko 140.000, preskaŭ la sama nombro, enmigris inkluzive 32 000 malliberulojn. Kompare en la 1850a jardeko ĉ. 700 000 enmigris – granda eksalto – plej parto de tiuj enmigris Viktorion. Tio triobligis la nombron de loĝantoj en tiu jardeko.

Miaj praparencoj, kiuj alvenis en 1853, estis verŝajne helpatoj de la Kolonia Parcela kaj Enmigrada Komisiono. La programo de Caroline Chisolm, La Familia Koloniiga Prunta Societo, venigis pli ol 5 000 inter 1851 kaj 1853, sed miaj praparencoj estis "asistataj enmigrantoj". Ili konis iun Sinjoron Ross en Melburno kaj restis kun li dum iom da tempo kaj poste loĝis en Prahano, sude de la urbocentro. Mi supozas ke William restis en Melburno

kaj ne iris al la orkampoj. Iom ne juna kaj kun graveda edzino, laŭ familia onidiro, li laboris kiel aŭ ĝardenisto aŭ ŝarĝportisto, multenspezaj laboroj en tiu epoko. Certe li estis tie en 1857 kiam malfeliĉege mortis la du filetoj. Charles, unujaraĝa, malsaniĝis kaj mortis. En la konfuzo, William, trijaraĝa, forvadis kaj dronis en rivereto. Mia prapraavo, George, naskiĝis en 1857 kaj tiel iĝis la plej aĝa filo.

William estis unu el duonmiliono kiuj alvenis en tiuj jaroj aŭ por serĉi oron aŭ por loĝi en nova lando. Alia tia estis Frank Allen, prapraavo de mia edzino. Deksejaraĝa, li alvenis ankaŭ en 1853 kun sia frato Freeman, deknaŭjaraĝa, sur la ŝipo Rockland. Frank kaj Freeman venis el Maine, Usono por serĉi oron kaj sendi la oron hejmen al la familio, antaŭ ol reveni al la gepatroj. Ĉu aventuro por junuloj? Eble komence, sed bedaŭrinde, post nur tri monatoj, Freeman mortis pro tifoido, apud Beechworth. Sur la ŝipo Frank kaj Freeman aliĝis al grupo de orserĉantoj, iuj el la sama loko en Maine. Tial Frank, post la morto de sia frato, ne estis tute sola pro subteno de amikoj. Sed certe estis ege malfeliĉa afero por li.

Kiel oni scias pri la tiaj sentoj de Frank? En 1990 praido de Frank en Wagga Wagga studis pri la familia historio. Li metis petleteron en usona ĵurnalo por informo pri siaj prapatroj. Mirinde li ricevis respondojn de tri parencoj, kaj unu el tiuj informis lin ke ŝi havas leterojn en kofro en la kokinejo! Inter tiuj leteroj estis 32 skribitaj de Frank al la gepatroj inter 1853 kaj 1878. Kia trezoro por studanto de familia historio! Kaj imagu, Frank devis skribi leteron je la aĝo de 17 por informi la gepatrojn ke ilia filo, lia frato, mortis. Jam en 1851 mortis ilia tiama plej aĝa filo.

En tiuj leteroj estas priskribo de la monotona laboro de la orkampo. Fosi, fosi kaj plu fosi. Ankaŭ pri la malsanoj kaj mortado de geamikoj el Usono. Ankaŭ kuzoj de Frank loĝis en la regiono. Unu havis drinkejon kaj alia melkejon. Do ne ĉiuj fosis. Frank, kun siaj kunlaborantoj, sufiĉe bone enspezis. Frank skribis ke dum semajno li povis enspezi tiom, kiom dum monato en Usono. Li skribis pri sendado de 18 uncoj da oro al sia familio. Tiu kvanto egalas ĉ. \$350 en 1854 kaj \$36 400 hodiaŭ. Li emfazis ke li sendis ĝin per fidulo, ĉar estis tiom da trompado tiutempe. Mi supozas, ke li sendis plu en aliaj jaroj.

Ne ĉiam estis enspezo. En februaro 1854 Frank devis pagi monpunon de \$15 al policisto ĉar li ne havis rajtigilon por orserĉi. Estis ofte ke la "fosantoj" ne havas rajtigilon kaj simple provis eviti la policistojn. Jen la malkontentego de la fosantoj. Frank skribis ke li deziris informi la policiston, ke li neniam pagos por la rajtigilo, sed pro prudento ne diris tion. Li skribis ke li preferus ĵeti la monon en la rivereton. Kvankam la viktoriaj instancoj malpliigis la koston de la unumonata rajtigilo de 30 ŝilingoj (\$3) ĝis 20 ŝilingoj (\$2), tiom ankoraŭ estis tro por multaj fosantoj. Kaj krome la policianoj ricevis parton de la monpuno. Bona instigo por kolekti multon. Jen la malkontentego kiu instigis la ribelon ĉe Ballarat en novembro 1854. Frank estis en Beechworth, iom for de Ballarat, do ne partoprenis.

Frank tendumis kun kamaradoj el Usono. Kvankam ili kundividis manĝaĵojn kaj ekipaĵojn, kiujn ili aĉetis aŭ en Usono aŭ en Melbourne, ili laboris en malgrandaj grupoj aŭ individue por trovi oron. Foje Frank laboris por alia orserĉanto kaj ricevis salajron. Li kontentis pri tio, skribante ke, kontraŭ unu orserĉanto kiu profitis pli ol li, estis tri kiuj ne enspezis tiom kiom li. En 1857 Frank havis rajtigilon

kiel buĉisto en la sama loko kie kuzo havis melkejon. Tiu kuzo jam reiris al Usono kiel multaj faris post jaro aŭ du. Frank laboris en la regiono de Beechworth sed, kiel aliaj, sekvis la spuron de nova oro. Rivero Buckland estis 80 km for, kaj tie alia kuzo havis drinkejon. Laŭ la leteroj oni ne tutcertas ĉu li estis tie dum 1857 sed iam li estis.

Kiel skribite, la usonaj kaj eŭropaj fosantoj laboris iom individue krom kiam iuj dungis aliajn. Ne same por la ĉinaj fosantoj. Ili kunlaboris amase. Kaj ili alvenis amase ekde ĉ. 1855. En 1858 estis 42 000 ĉinoj en Aŭstralio. Ĉu la britoj parte helpis pri tio? En la 1840aj jaroj okazis la unua "opia" milito en Ĉinio. La celo de la britoj estis malfermi la merkatojn de Ĉinio per libera uzo de ties havenurboj. Estis profite ke la britaj ŝipoj forportu pagantajn pasaĝerojn el Ĉinio. En 1848 posedantoj de la grandbieno en Aŭstralio venigis 120 ĉinajn laboristojn, ĉar ili ne plu havis sufiĉajn bienlaboristojn, kaj ĉar ili ne deziras pagi multon. La registaro ne plu dissendis senkostajn malliberulojn por labori ĉe la bienoj. Aŭ almenaŭ ne sufiĉajn.

Sur la orkampoj estis netoleremo pri la ĉeesto de la ĉinoj. Laŭ la angleparolantoj ili havis strangajn kutimojn. Ili laboris dimanĉe, ili festis ĉe la tombejo, ili fumis opion, ili vetludis, ili havis strangan nekompreneblan lingvon! Ili ŝtelas nian oron! La ĉinoj ofte ree prilaboris jam prilaboritajn minojn, sed la forlasintoj de tiuj deziris havi ŝancon reveni. Unu malbona agado kontraŭ la ĉinoj okazis ĉe Rivero Buckland en julio 1857. Estis kunveno de fosantoj eŭropaj (ĉefe usonaj laŭ la ĵurnalo *Ovens and Murray Advertiser*) je la 4a de julio en drinkejo. La usonanoj jam spertis la konkurencon kontraŭ ĉinaj fosantoj en Kalifornio, kaj incitis centon da fosantoj iri al la

Daŭras >

orkampo kaj forpeli la ĉinojn. Malgraŭ ke estis ĉ. 2 000 ĉinoj, tiuj forlasis la lokon kaj la atakantoj bruligis la tendojn kaj konstruaĵojn. Poste en kortumo oni ne povis trovi atestantojn eŭropajn pri la atako kaj oni ne akceptis la ateston de la ĉinoj.

La maltoleremego kontraŭ la ĉeesto de la ĉinoj daŭris. En 1861 okazis la *Lambing Flat Riot* (Tumulto¹ ĉe ŝafnaska herbkampo). Lambing Flat estas la antaŭa nomo de Young, NSK (Nova Sud-Kimrujo). Je tiu okazo proksimume 3 miloj da eŭropaj fosantoj forpelis la ĉinojn el la orkampo tie. Ĉifoj la nombro de ĉinoj estis ĉirkaŭ 500. Estis kunvenoj de la orministoj en kiuj ili postulis ke la kolonia registaro malpermesu la eniron de ĉinoj. Ankoraŭ ligita al britaj leĝoj, kiuj permesis egalajn rajtojn al orserĉantoj, la NSKa registaro ne povis plenumi la postulojn de la ministoj. Estis malfacile por la malmultaj policistoj regi aferojn sur la orkampo pro distancoj kaj pro la granda nombro da fosantoj. Tial dominado far la pli granda homamaso ofte iĝis la realo, ĝis la alveno de pli da policistoj kaj la armeo. Pro la forta malŝato kontraŭ la ĉinoj la registaro en 1861 enkondukis la Akton pri la Enmigrado de Ĉinoj, por limigi la eniron, restadon kaj nombrojn de ĉinoj en la kolonio. Tio daŭris longe ĝis kaj en la 20a jarcento kaj estis semo por la Blanka-Aŭstralia Politiko.

Do ĉu nia kara Frank partoprenis en tiuj tumultoj? Li certe ne skribis pri tio. Frank estis en la ĉirkaŭaĵo de Rivero Buckland en 1857 kaj sekvis la orserĉantojn al Kiandra en la Neĝa Montaro, kaj poste al Young, NSK. Inter 1861 ĝis almenaŭ 1863 li estis en Young, kie li edziĝis kaj laboris en manĝprovizejo de Ralph Halls. Iom post iom la orkvanto en Young malpliigis kaj en 1866, kiam oni trovis oron en Grenfell, NSK, Frank kaj Ralph iris

al Grenfell por vendi provianton. Poste Frank aĉetis bienon por paŝti ŝafojn kaj bovojn. Ironie, sur lia bieno nuntempe estas orminejo. Li sidis sur oro sed ne sciis. Li neniam reiris al Usono, kvankam li ofte en siaj fruaj leteroj promesis fari tion. Iam li skribis ke ne eblis reiri pro la usona enlanda milito, pro la kosto reiri, pro la...

En 1992 mi laboris en Tumbarumba, NSK, la naskiĝloko de mia praavo, George. Lia patro, ankaŭ George, estis tiu naskita en Melburno en 1857 post la morto de siaj du fratoj. George forlasis Melburnon en 1877, forkuranta kun la irlanda servistino. Ili geedziĝis en Tumbarumba kaj setlis tie. Laŭ la geedza dokumento, George estis ministro. Apud Tumbarumba oni trovis oron sed malmulton. Oni trovis ankaŭ juvelojn en la riveretoj. Dum mia labortempo sur pomkreskejo estis rompo en la rikoltperiodo kaj kun kelkaj kunlaborantoj ni iris juvelserĉi. Estis mia unua sperto tia. Kia ĝi estis? Inter ni estis nur unu kribilo, grava ilo por serĉi juvelojn, kaj mi rimarkis iom da avaro rilate al la posedo de ĝi. Ĉu la febro (frenezeco?) komencis kapti nin? Ni ne trovis multon.

Kia vivo estus por orserĉantoj el foraj landoj en kondiĉoj malsanigaj, malriĉaj, sen sufiĉe da trinkebla akvo kaj manĝaĵo, varmegaj kaj malvermegaj? Malfacile imagi. Ĉu miaj prapatroj agis malsame kiel tiuj, kiuj forpelis la ĉinojn kiel ŝafojn el la kampoj kaj lando? Kiel mi agintus? **E**

¹. Eble pli taŭga vorto estas Ribelo. Almenaŭ dufoje ĉe amaskunvenoj, la policanoj legis la Akton kontraŭ Amasregado. Tio postulis ke la amaso disiĝu kaj pace iru hejmen. Ambaŭfoje la amaso ne obeis sed iris por minaci la ĉinojn.

Pasporta Servo

OSCAR BETANCOURT (BRISBANO)

La unuan fojon kiam mia edzino kaj mi uzis Pasportan Servon

Mi esperas, ke mia rakonto pri nia sperto, kiam ni uzis Pasportan Servon, kuraĝigos vin aliĝi. Por klarigi pri nia situacio: mia edzino subtenas mian intereson pri Esperanto sed nuntempe ŝi ne interesiĝas lerni ĝin. Do ni uzas Pasportan Servon, kvankam nur mi estas esperantisto.

La unua paŝo estis krei mian konton je Pasporta Servo, kaj mi uzis Google Translate por traduki tion, kion mi ne komprenis aŭ pri kio mi ne estis certa. Jen mi devas konfesi, ke kvankam mi komencis lerni Esperanton antaŭ pli ol kvin jaroj, mi daŭre konsideras min komencanto.

Estas grave por ĉiu esperantisto scii, ke Pasporta Servo ekzistas, kaj por loĝado kaj por ĉiĉeronado. La celo de nia vojaĝo estis konatiĝi kun eble plej multe da Eŭropo laŭ la sekvaj komencaj kondiĉoj: tempo de ferio esti unu monato; buĝeto

\$AŬ5 000; gustumi diversajn veganajn manĝaĵojn.

Tiam mi serĉis la liston de esperantistoj en Pasporta Servo, kiuj loĝas en tiuj urboj, kiujn ni volos viziti. Mi kontaktis nur tiujn, kiuj loĝas proksime al la centro de la urbo. Tiel ni povos promeni tra la plej gravaj historiejoj. Unue mi kontaktis nur unu personon en ĉiu urbo, inter du kaj tri monatoj antaŭ la vojaĝo. Mi atendis iliajn respondojn. Luj respondis, aliaj ne. Do mi skribis al alia persono en urbo el kiu mi ricevis aŭ negativan aŭ nenian respondon.

Per Pasporta Servo ni trovis loĝejojn en Barcelono kaj Berlino, ambaŭ po du tagoj.

En Barcelono, familio bonvenigis nin. Tie ili pruntis al ni la salonan vestiblon, kie ni uzis ilian sofo-liton por dormi. Ni matenmanĝis kaj vespermanĝis unufoje kun ili. Kiam ni estis kune, plejofte ni parolis la hispanan, sed inter Klara,

Daŭras >



En Barcelono

Samuel kaj mi, ni parolis Esperanton.

En Berlino, la lasta urbo kiun ni vizitis en Eŭropo, alia familio bonvenigis nin en sia hejmo ĉe la norda kvartalo de la urbo. Ili pruntis al ni neokupitan dormejon. Kune ni parolis la anglan, sed inter Felix, Ursula kaj mi, ni parolis Esperanton.

Konklude, nia sperto estis tre pozitiva. Poste mi ŝanĝis mian konton ĉe Pasporta Servo, por esti ĉiĉerono en la urbo kie mi loĝas, ĉar kvankam mi ne povas gastigi esperantistojn, mi povas montri al ili mian urbon per Esperanto, kaj tiel, per Esperanto konatigi miajn ĉirkaŭaĵojn. 📍



En Berlino

Vizito al la tria insulo

DAVID RYAN (WELLINGTON, NOV-ZELANDO)

Nov-Zelando havas du ĉefajn insulojn: Nordan kaj pli belan Sudan Insulon. Tamen, tria insulo, Stewart Island, troviĝas je 30 kilometroj sube de la Suda Insulo.

La Insulo Stewart estas relative granda insulo (1746 km²) sed tie loĝas nur 400 homoj, ĉar nacia parko/arbaro kovras 90% de la insulo kaj, pro tio, turismo kaj fiŝkaptado estas plej gravaj por la insulo. Vizitas sufiĉe multaj novzelandaj kaj eksterlandaj turistoj. Dum la somero estas ĉiutage kvar vojaĝoj en eta 72-pasaĝera pramŝipo (unu horo) kaj tri flugoj en aviadileto (20 minutoj) el Bluff/

Invercargill en la suda parto de la Suda Insulo. Dum la periodo de KOVIM-19 la insulo ricevis multajn turistojn, ĉar novzelandanoj ĝenerale ne rajtis vojaĝi eksterlanden kaj tial multaj homoj, por unua fojo, decidis viziti la insulon.

Mia edzino kaj mi pasigis unu nokton en la Insulo Stewart en januaro 2024. Multaj vizitantoj pasigas tie kelkajn tagojn por promenado kaj tendumado en la nacia parko, sed por aliaj, unu tago aŭ eĉ nur kelkaj horoj sufiĉas. Krom fiŝkaptado, promenado, ĝuado de la natura pejzaĝo, kaj aŭskultado de la bela

kantado de multaj birdoj, ne estas multo por fari. Tamen, se oni bonŝancas, eblas vidi kivitajn, kiuj aktivas nokte en arbara habitato.

Estas nur unu vilaĝo, Oban, kie troviĝas unu restoracio, policejo, du preĝejoj, muzeo, kelkaj hoteloj, malgranda biblioteko, baza lernejo, kaj fajrobrigadejo. La insulo havas multajn belajn plaĝojn,

sed mi imagas, ke la vetero estas tro malvarma por tie naĝi kaj sunbruniĝi.

Ni promenis ĉirkaŭ Oban, faris multajn fotojn, kaj babilis kun francaj turistoj. Mia edzino kun granda plezuro manĝis tre freŝan fiŝaĵon en la restoracio. Se oni havos sufiĉan tempon dum vizito al Nov-Zelando, mi rekomendas viziton al la Insulo Stewart. 📍



Dekstre: La plej malnova domo en la insulo (konstruita en 1835)

Sube: Vilaĝo Oban



Financaj raportoj de AEA

The accounts have been prepared using the MYOB computer accounting system.

Income on our Fondusoj and Term Deposits have increased to \$6 275.00 for the year, significantly higher than the last few years. Our membership fees are slightly up from 2022, owing to some life memberships, but overall there is a decrease to 83 members.

Congress income and expenses are skewed, owing to payments and receipts occurring in different financial years.

Our assets are over \$221 000, which ensures our financial viability for some time to come.

Heather Heldzingen
Treasurer

Profit & Loss Statement

1/01/2023 through 31/12/2023

31/12/2023
5:35:10 PM

Income	
Membership Subscriptions	\$2,375.00
Congress Income 2023	\$8,649.00
Congress Income 2024	\$27,448.40
Book sales	\$486.39
ESK Reimburse. from NZ	\$1,375.00
Donations	\$333.99
Fonduso a/cs interest	\$3,588.07
Miscellaneous Income	\$70.00
Internat. Travel Fund Interest	\$2,687.38
Total Income	\$47,013.23
Cost of Sales	
Gross Profit	\$47,013.23
Expenses	
Bank fees	\$11.64
Book printing	\$268.82
2023 Congress Expenses	\$21,574.50
2024 congress expenses	\$13,398.20
Donations	\$855.00
Computer & internet expenses	\$817.77
Miscellaneous Expenses	\$112.00
Consumer Affairs Fees	\$61.20
ESK Printing	\$2,422.77
Postage	\$2,602.77
Repairs and Maintenance	\$264.00
Printing & Stationery	\$1,244.44
Total Expenses	\$43,633.11
Net Profit / (Loss)	\$3,380.12

Balance Sheet

As of December 2023

31/12/2023

5:30:05 PM

Assets

Current Assets

Cash On Hand

CBA Operating A/c 00903636	\$4,936.29
CBA Summerschool/congress A/c	\$26,715.79
Capital A/c 00946975	\$1,862.87
Petty Cash	\$100.00

Total Cash On Hand \$33,614.95

Fondusoj

CBA Term Deposit 50170900	\$51,150.00
CBA Term Deposit 94715	\$50,565.74
Int. Travel Fund 50143134	\$74,389.77

Total Fondusoj \$176,105.51

PAYPAL

\$946.35

UEA Account Code AEAA-Z

\$778.63

Correspondence Course

Correspondence Bank A/c 918439

\$365.12

Total Current Assets

\$211,810.56

Other Assets

Accounts Receivable

\$1.20

Book Inventory

Libroservo \$952.50

AEA Library \$7,145.28

Total Book Inventory

\$8,097.78

Total Other Assets

\$8,098.98

Property & Equipment

Equipment

Equipment at Cost \$1,516.27

Total Equipment

\$1,516.27

Total Property & Equipment

\$1,516.27

Total Assets

\$221,425.81

Liabilities

Net Assets

\$221,425.81

Equity

Fondusoj Funds

\$145,762.17

Retained Earnings

\$65,282.22

Life Membership Funds

\$5,851.06

Current Year Earnings

\$3,380.12

Historical Balancing

\$1,150.24

Total Equity

\$221,425.81

KONTRIBUU al ESPERANTO

sub la suda kruco

La limdato por la
venonta numero estas
la 1a de majo. Sendu
artikolojn, rakontojn,
enigmojn, receptojn,
fotojn ktp al
esk@esperanto.org.au -
ni bezonas vin!



Agnoskoj pri fotoj

Kovrilo Andrew Woods

4 Kam Lee

5, 6 David Ryan

8 NordWood Themes, per Unsplash

9 Terry Manley

10 VietnamWar.govt.nz:
vietnamwar.govt.nz/veteran/maj-harold-
william-rosen-petersen

12 KAVA-PECH

13 MidJourney

16 Igor Omilae, per Unsplash

17 *Bildo 1*: Jonathan Cooper;

Bildo 2: Art Gallery of NSW

18 *Bildo 3*: Pinacoteca di Brera, Milan,
per Wikimedia Commons;

Bildo 4: Rijksmuseum, per Wikimedia
Commons

19 Jonathan Cooper

20 University Science Books, *Quantum
Chemistry*, de Donald A McQuarrie

21 *Bildo 7*: Musée de l'Orangerie, per
Wikimedia Commons;

Bildo 8: Jonathan Cooper

25, 26 Oscar Betancourt

27 David Ryan

32 Internacia reta kunveno per Zoom,
uzante Esperanton. Foto: Jonathan
Cooper

Australian Esperanto Association

GPO Box 2122
Melbourne VIC 3001
Australia

esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
0403 358 941

Sandor Horvath | **President**
Jonathan Cooper | **Vice-President**
Heather Heldzingen | **Treasurer**
Joanne Johns | **Secretary**

Committee Members:

Terry Manley, Esther Parris

AEA was established for the promotion, teaching, and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.



Bradley McDonald | **President**
Chris Krageloh | **Vice-President**
David Ryan | **Secretary/Treasurer**
Dave Dewar | **Assistant Secretary**

Committee Members:

Erin McGifford, Josuo Moss, Stephen Epstein

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, and answering queries about the language.

New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

www.esperanto.org.nz
esperantonewzealand@
gmail.com
0800 350 781

What is this?

Have you picked up this magazine by chance and are wondering what language it is? It might look a bit like Spanish, but it's actually Esperanto.

What is Esperanto?

Esperanto was specially planned and created as a neutral second language for people all over the world. So, if you come across someone from, say, Finland, you wouldn't have to speak Finnish and they wouldn't have to speak English.

Originally developed in the 1880s, Esperanto is currently experiencing a resurgence, with more and more people discovering and learning it online. It's spoken in over 100 countries and there are thousands of Esperanto clubs worldwide.

Esperanto is much easier to learn than any national language, because it was designed to be easy to learn. It's completely phonetic, and its grammar is logical and regular.

You can use Esperanto for travel, information, friendship, hobbies, and even business. The World Esperanto Association publishes a list of names and addresses of people who are happy to have you stay with them for free if you speak Esperanto.

The internet makes it easy to connect to Esperanto speakers in any country. Google, Facebook, Firefox and Linux all support Esperanto. There's an Esperanto version of Wikipedia, which has over 300 000 articles (more than the Hebrew version, for example).

Isn't English enough?

National languages like English give an unfair advantage to their native speakers. People who have studied English for over ten years still feel at a disadvantage when talking with a native speaker.

Interested? See the contact details on the inside back cover.

